



34th ANNUAL CONGRESS



ESPERANTO ASSN. OF NORTH AMERICA

OKLAHOMA CITY, OKLA. July 4,5,6, 1941



MAKES NO DIFFERENCE HOW BUT COME!

ENJOY WHOLESOMED WESTERN HOSPITALITY

The Oklahoma-Biltmore will be Congress Headquarters Rates \$2.50 and \$3.50 Make reservations. Congress Tickets-\$3- from Mrs. Jewel Bainbridge Oklahoma-Biltmore. HURRY*DON'T WAIT!!!!

HONOR ROLL — PATRONOJ kaj SUBTENANTOJ — 1940-1941

Esperanto Society of Detroit, Mich., Mrs.L.K.Beecher, Lima, Ohio. Miss Roan U.Orloff, Boston,Mass., A.S.Mellichamp, Peoria,Illinois, Louis Dormont, Brooklyn, N.Y., Fritz Mitschke, Paterson, N.J., Dr.Cecil Stockard, Bradenton, Fla., Fred H.McMann, Troy, N.Y., G.P.Ferree, Chenoa, Ill., Robert L.Davis, Detroit, Mich., Dr.F.W. Breth, Petrolia, Pa., TWO ANONYMOUS, Virgil Dibble, Columbia,S.C., Miss Grace Randolph, Greenville, R.I., Dr.Lydia Allen DeVilbis, Miami, Fla., Prof. Edwin L.Clarke, Winter Park, Fla., A.E.Regal, Chicago, Ill., Mrs.Windsor H.Wyman, No.Abington,Mass., F.T.Dwyer, Sacramento, Calif., Hans Julow, So.Hadley, Mass., James F.Morton, Paterson, N.J.,J.A.Forrrell, White Bear Lake, Minn.,O.B.Collier, Detroit, Mich.,Prof. Frank Tomich, Cleveland, Ohio. E.G.Dodge, Dr.Fred G.Cottrell and William Plampin, Washington, D.C., Mrs. Alois Zerzwina, Mount Clemens, Mich.

The majority of the above named contributors have been the main support of the EANA for several years, and are entitled to the most sincere thanks of all members. There is always room for the addition of new names to the list. Patrono pays \$10.00, Subtenanto \$5.00—includes membership and "American Esperantist" for one year from date on receipt card. ALL ARE WELCOME--COME IN!!!

A VERY INTERESTING COLUMN, pri Esperanto appeared in the May 4th edition of the New Haven "Sunday Register". Several people wrote in that it was a full page, but 4/5 of the page was picture.

LISTO DE PETANTOJ kaj Iliaj asignoj al la Steloj de VERDA STELO GEFRATARO (VoSoGo) 1940-1941
Stelo Unua. S-ro Upton, Little Rock, Ark., S-ino Hemans, Little Rock, Ark., F-ino Van Frank, Little Rock, Ark., S-ro W.Wilson, Lancaster,Pa. S-ro J.Stuart, Czar, Alberta.
STELO DUA. S-ro B.Robinson, Mobile, Ala., S-ro McIntyre, Pine Bluff, Ark., S-ro J.Tomishin, Cleveland, O., F-ino E.Wodzinski,Hamtramck, Mich., S-ino Kincaid, Portland, Ore.
STELO TRIA. S-ro O.B.Collier, Detroit, Mich., S-ro Thomas Goldman, Washington, D.C., S-ro L.D.Stern, Aurora, Ohio. S-ro J.Lido, Brooklyn, N.Y., S-ro W.Vathis, Mauch Chunk, Pa.,
STELO KVARA. S-ro F.Martin, Rockland Mass., S-ro A.Perley, Baltimore, Md., S-ro C.Laws, Innisfree, Alberta. S-ro C.Fisher, Meadville, Pa. S-ro N.Sadagursky, Ozone Park, N.Y.

NOTO: Ciu "radio" estas petata sendi al la Direktoro de VSG leteron aŭ poŝtkarton antaŭ la Kongreso kun sugestoj, dezirataj ŝanĝoj, plendoj, ktp. La Direktoro..... F.A.Post-nikov, "Espero" Route #5, Box 606 Little Rock, Arkansas.

RICHMOND HIGHLANDS, Washington. This young Assembly has opened a Baha'i Fellowship House, which stands under towering trees on a highroad making for easy access..... Courses in Esperanto will be offered. Mr. B.J.Schneider, Secretary S K.

"URBO SEN ALMOZULO" is a headline in the May issue of "Tagigo", the official organ of the Esperanto Association of Hong Kong which tells the world of a large city --- Jen'an, in the north China province of Shansi--- where there are no beggars. Can any city in America match it? Line forms on the right-don't crowd!!!!

GOOD NEWS FROM BOSTON. Miss Roan Orloff, Esperanto's Fervorulino is again able to circulate and busy herself with Esperanto and affairs of state. Congratulations.

WASHINGTON ESPERANTISTS-Central and Western High School clubs, and the Washington Club, will picnic at the summer home of Mrs.Thomas Goldman, on Potomac Shores, near Indian Head, Maryland, afternoon of June 19th.



LEARN ESPERANTO by CORRESPONDENCE BEGINNERS and ADVANCED. Instructor is a Licensed EANA Teacher. "Esperanto-By-Mail" St.Albans, New York.



O B R A S I L E S P E R A N T I S T A

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.

Número 39-40 — Redator responsável: Dr. Carlos Domingues: — Marto-Aprilo-1941

Administração e redação: Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. Brasil.

V I V U L A T U T A M E R I K A T A G O

14 — A P R I L O — 1941

M I A J O K J A R O J

CASIMIRO DE ABREU
(poeto brazila, 1837-1860).

Ho, kun kiomaj saŭdadoj
mi pensas pri l' vivaŭroro!
L' infana aĝo de oro,
ha! ĝi ne revenos plu!
Agrablaj tagoj de floroj
kaj revoj sub oranĝuoj,
je l' ombro de bananujoj,
ho, tempo de am' kaj ĝu'!

L' ekzisto ekvekiĝante
belegajn tagojn eniras:
l' animo ĉastecon spiras,
kiel odoron la flor'.
La mar' estas klara lago,
ĉielo — blua mantelo,
la mondo — sonĝo pri belo,
la vivo — himno de l' kor'.

En tiu ripozo ĝoja
la nokt' estas melodia,
kaj ĉio tre simpatia:
l' aŭroro, vivo kaj sun'.
La tero ĉarme parfumas,
la steloj al ni ridetas,
la sablon l' ondoj kisetas,
la maron kisas la lun'.

Printempa ĉielo mia,
ho tagoj de la juneco,
en kiuj ĉiam gajeco
kaj rid' akompanis min!
Anstataŭ la nunaj plendoj
mi havis tiam sen fino
kareson de la patrino
kaj kisojn de la fratin'.

Libera filo de l' montoj,
mi tra l' kamparoj kuradis
nudbrake, sen ŝu' iradis,
kaj estis kontenta mi;
ĉemizon ne butonumis,
la akvofalojn serĉadis,
kaj ofte kapti penadis
flugilojn de papili'.

En tiuj tempoj feliĉaj
mi kolektadis *pitangojn* 1),
sur arboj serĉadis la *mangojn* 1)
kaj ludis apud la mar'.
Mi preĝis "Ave Maria",
ĉielon bela trovadis,
kun rido mi ekdormadis
kaj kantis ĉe la ekstar'.

ARBOJ FALINTAJ

I. Matos Quinaud.

Arboj falintaj brue kaj sen ordo
sur la teron — rimarku mia filo! —
jen kion kaŭzas de l' homo la hakilo
senkompata, en sudo kaj en nordo.

Pro ĝia detruemo la trankvilo
de la arbaro, — paco kaj konkordo, —
rompiĝas ja simile al la kordo
streĉita de malnova sagfeto...

Estas krioj, bedaŭroj; estas ĝemo,
dume daŭras laboro malbenata
kaj arboj mutaj kuŝas sur la tero!

Tiel same en koro Nekredemo,
— la infera hakilo senkompata, —
detruas la arbaron de l' Espero!

PREGO AL LA PACO

I. Matos Quinaud.

Orfaj infanoj ploras sur la tero,
patrinoj preĝas, krias la homaro,
la landoj brulas, brulas eĉ la maro,
la mond' aliformiĝas je infero!

Milito kreskas! Jaron sekvas jaro
kaj ĉie restas kruda la danĝero;
mensogo reĝas kaj sin kaŝas vero
en nekonata puto de l' arbaro!

Ho dia Paco, mi plorante venas
preĝi al vi, kiun la homoj benas,
bonfarema diino de l' laboro!

Baldaŭ revenu, Paco, el ĉielo,
— vi, de la vivo la eterna celo, —
kaj lumon portu por la homa koro!

1) Pitangoj kaj mangoj estas fruktoj de certaj arboj.

BRAZILA REVUO DE GEOGRAFIO

De s-ro Ismael Gomes Braga la prezidanto de B. L. E. ricevis la jenan leteron: "Rio de Janeiro, la 11an de Marto 1941a. D-ro Couto Fernandes, Koran saluton!

Kun vere granda entuziasmo mi legas la kolektojn de la revuo de "Instituto de Geografia e Estatística" ĵus ricevitajn.

La longaj resumoj en Esperanto es-

NEKROLOGO

tas neriproĉeble perfektaj kaj sufiĉas por kompreno de la artikoloj. Tial ke ili estas presataj en literoj pli grandaj ol la alilingvaj, oni tuj sentas, ke Esperanto ne estas fremda lingvo, sed vere nia. La bonega papero kaj graveco de la enhavo okazigos la konservadon de la jarkolektoj de tiu monumenta revuo dum jarcentoj en bibliotekoj. Tiu grava laboro venigas al mi en la kapon la versojn de Longfellow:

... "Je l' estonto blinde ne konfidu,
pri l' estinto plu ne zorgu vi;
sed per l' ago l' estanton decidu,
bonfarante fidu vi al Di'.

*Pruvas la vivo de la homoj grandaj
ke ni povas vivi por progres',
kaj postlasi postsignojn vivantajn
en la sablo de la tempo-pres'.*

*Kaj postsignojn tiujn eble vidos
navigante en vivmaro frat',
kaj ilin en danĝero lin gridos
kaj lin savos de malbona fat'.*

*Do, ni fortaj kaj kuraĝaj staru,
egalaj en ĝojo kaj sufer';
nelacante, nian devon faru
kaj labori lernu kun esper'."*

Ja, tiaj kolektoj restos malgraŭ ĉiuj "metamorfozoj" de la nuna tempo. Mi dankas kaj gratulas vin pro via elstara kunlaborado en tiu grava eldonaĵo.

Vin kore salutas dezirante al vi ĉion bonan,

Via

Ismael.

GEOGRAFIO KAJ ESPERANTO

Jam aperis la volumo XLVII — 1940 de la "Revuo de la Societo de Geografio", kiu enhavas 210 paĝojn kaj resumojn nur en Esperanto de 12 artikoloj. Ĝi konsistas el du partoj, el kiuj la unua parolas pri la antaŭ nelonge mortinta Generalo Moreira Guimarães, prezidinto de la Geografia Societo kaj fervora esperantisto. La revuo transskribis la artikolon pri tiu karmemora mortinto aperintan en la gazeto "O Brasil Esperantista".

El la dua parto ni citas la artikolojn, kies titoloj estas la jenaj: "La Arkeologiaj Restaĵoj en Brazilo", de Kolonelo Barros Fournier; "Geografio kaj modernaj direktoj", de prof. Aroldo de Azevedo, el São Paulo; "Komentario pri la libro de Lindolfo Cólora, titolita "Garibaldi kaj la Milito de la Ĉifonuloj", farita de Admi-

DOM ALFONSO XIII DE BORBÓN. La 28an de Februaro lasta mortis en Romo Lia Moŝto D. Alfonso XIII de Borbón, eksreĝo de Hispanujo. Naskiĝinte la 17an de Majo 1886a li surtroniĝis en la sama tago de la jaro 1902a. Kiam estis proklamita la respubliko, li devis forlasi, sian patrujon, al kiu li ĉiam servis kun granda patriotismo.

Li estis granda amiko de Esperanto. Li donis al D-ro L. L. Zamenhof la komandoran insignon de la Ordeno de Izabelo, la Katolikino, kaj akceptis la honoron esti la Alta Protoktanta de la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Barcelono en la jaro 1909a.

Brazila Ligo Esperantista reprezen-

BIBLIOGRAFIA FAKO

STATISTIKA RESUMETO, eldonita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Rio de Janeiro 1940. 26 p. 188×270 mm. Prezo ne montrita.

Unu paĝo da statistiko valoras dek paĝojn da tesko. Tiu povas esti vera kiel ĝenerala diro, sed vidinte la grandajn paĝojn de la supre nomita broŝuro oni emas diri, ke paĝo da statistiko valoras tutan libron da teksto.

Statistiko estas valora ne nur pro tio, ke ĝi ebligas prezentadon de multe da informoj sur malmultaj paĝoj, sed ankaŭ pro tio, ke statistiko prezentas nur faktojn, ne teoriojn aŭ opiniojn. Alivorte, en statistiko oni ricevas informojn purajn, sen almikso de surrogato.

La recenzata verko enhavas geografian statistikon pri Brazilo. La statistika informo pri tiu lando estas donita sub ses rubrikoj: Fizika Situacio, Demografia Situacio, Ekonomia Situacio (okupas 7½ paĝojn), Socia Situacio, (4½ paĝoj), Kultura Situacio (6½ paĝoj). Administracia kaj Politika Situacio.

Kaj la amplekso kaj aranĝo de la enhavo de tiu broŝuro estas tre bonaj. Domaĝe nur, ke la formato estas iom tro granda por facila enpakigo kaj enpoŝigo. — *K. F.*

(El "Scienca Gazeto", eldonita de "Amerika Esperanto-Instituto", Rockford, Illinois. Usono.)

ralo Raul Tavares, prezidanto de la Geografia Societo, kaj artikolo pri Urbo Tanabi, verkita de nia samligano Sebastião de Oliveira.

tiĝis ĉe la solena meso dirita en Rio-de-Janeiro intence de lia animo.

GENERALO ROBERT BADEN-POWEL. Kun la aĝo de 83 jaroj mortis en Anglujo la granda generalo R. Baden-Powell, la genia fondinto de la internacia movado, konata sub la nomo "Skoltismo". Dum 32 jaroj li servis ĉe la brita militistaro, kie li distingiĝis, kiel valora oficiro.

En 1918 fondiĝis en Anglujo la "Skolta Esperantista Ligo" (S. E. L.), kies oficiala organo estas "Skolta Bulteno", kiu sukcesis havi agentojn en pli ol 30 landoj. Ĝia agento en Brazilo estas s-ro A. Couto Fernandes, kiu dum kelkaj jaroj, helpata de s-roj Guilherme Azambuja Neves, jam mortinta, kies servoj al Skoltismo estis mirindaj, kaj David de Barros, nuna ĝenerala sekretario de la "Brazila Skolta Unuiĝo" kaj reprezentinto de nia Ligo ĉe Internacia Ĵamboreo, faris viglan propagandon ĉe la brazilaj skoltoj.

En Aprilo 1912a la "Unua Brazila Skolta Kongreso" aprobis, per aplaŭdoj, deziresprimon konsilantan al ĉiuj skoltoj la lernadon de la helplingvo Esperanto.

La prez. de B. L. E. sendis al la "Brazila Skolta Unuiĝo" kondolencan telegramon, kiun tiu ĉi dankis pere de sia ĝen. sekretario. Ripozu pace, granda bonfarinto de la Homaro!

D-RO DUNSHEE DE ABRANCHES. En la 10a de Marto nunjara mortis en Petropolis d-ro Dunshee de Abranches, tre konata ĵurnalisto kaj verkisto kaj eksdeputito. Delonge li estis tre simpatia al Esperanto. Ĉeestinte, en kompanio de Medeiros e Albuquerque, la Duan Universalan Kongreson de Esperanto, okazintan en Genevo, en la jaro 1906a, li skribis al amiko malfermitan leteron, kiu aperis en grava brazila ĵurnalo, per kiu li elmontris sian admiron pro la sukceso de tiu kunveno de esperantistoj alvenintaj el pli ol 30 landoj. Poste li subskribis la skribpeton senditan al la Ligo de Nacioj pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj prezentis al la Brazila Deputitara Ĉambro proponon pri jara subvencio al "Brazila Ligo Esperantista".

La prez. de B. L. E. ĉeestis la mesojn diritajn en ĉiuj altaroj de la Preĝejo de Lapa, de kies Kunfrataro li estis Prioro.

Al lia familio niajn sincerajn kondolencojn!

BRAZILA KRONIKO

CEARÁ. Fortaleza. — F-ino Maria Stael Porto, delegitino por katolikaj aferoj kaj prezidantino de "Katolika Esperantistina Klubo", forlasis siajn oficojn kaj eniris en monaĥejon. Ŝin anstataŭis f-ino Zeneida Porto.

Baturité. — La 15an de Decembro 1941a fondiĝis la "Verdstelo Esperanta Grupo", kies estraro konsistas el la jenaj personoj: S-ro Leütenanto João Gurgel de Moura — prez., José Francelino — sek. kaj Luis Erich Menezes — kasisto. Jen ĝia adreso: Praça da Matriz, 168. *Baturité. Ceará.* Ni esperas, ke ĝi aliĝos al niaj nacia kaj internacia Ligoj. Koran dankon pro la sendita cirkulero.

RIO-GRANDE-DO-NORTE. Natal. — S-ro Moacir S. Cunha, laborema prezidanto de la loka asocio, transloĝiĝis al Recife. Tial, por lin anstataŭigi, oni akklamis s-ron João Pereira Siqueira, malnovan anon de BLE, kiu ankaŭ direktos la kurson, kiun tiu komencis. Apartenas ankaŭ al la Honora Komitato de tiu asocio prof. Clementino Câmara. Artikoloj pri Esperanto aperis en la ĵurnalo "O Diário".

PERNAMBUCO. Recife. — Jam aperis la Januara kaj Februara numeroj de "Pernambuco Esperantista". S-ro J. Teles da Silva, unua sek. de BLE, revenante al Rio-de-Janeiro, post vizito al sia naskiĝa ŝtato, pasigis unu tagon en Recife, kie li havis okazon viziti la Praktikan Komercon Akademion, sidejon de la kurso de Esperanto nun farata de S-ro Arthur Azevedo, kiu ĝuste tiam donis lecionon. Post la leciono s-ro Teles da Silva, kiu havis la plezuron konatiĝi kun la instruanto, kaj aliaj gesamideanoj, el kiuj ni citas f-inon Elza de Araujo, filinon de nia karmemora Odilon de Araujo, kiu kun sia fratino f-ino Artemisa daŭrigas la laboron komencitan de sia patro, kaj s-ron Moacir S. da Cunha, kiu ĵus alvenis el Rio-Grande-do-Norte, salutis la tieajn geesperantistojn kaj elmontris sian agrablan impreson kaj admiron pro ilia entuziasmo. Li transdonis al ili memoraĵojn de la prez. de BLE. Poste per belaj dankaj vortoj lin respondis s-ro Artur Azevedo.

BAÍA. Salvador. — D-ro Jaddo Couto Maciel, kies entuziasmo kaj dediĉo por Esperanto estas bone konata, preparas tre agrablan surprizon ĉe la turisma fako.

SÃO PAULO. S. Paulo. — En ĝenerala kunsido, okazinta la 15an de

Februaro lasta, "S. Paŭlo Esperanta Klubo" elektis sian novan estraron konsistantan el S-roj D-ro Joaquim Branco — prez., Osvaldo Leite de Moraes — vicprez., Mario Franzolim — sek., Armando Cambiaghi — kas. kaj José Ranzani — bibliotekisto. Estas ankaŭ elektitaj: Direktoro de la Instruado de Esperanto — s-ro Mario Rodrigues Monteiro kaj Direktoro de propagando — d-ro Geraldo de Azevedo. Ni esperas, ke la nova estraro daŭrigos la viglan laboron faritan de la antaŭa. Jen la nova sidejo de la klubo: Rua Alabastro, 462.

Santos. — La 15an de Decembro lasta, okaze de la 81a naskiĝa datreveno de nia Majstro kaj de la 50a datreveno de la aperigo de la "Plena Lernolibro de la lingvo Esperanto por Boemoj", verkita de prof. Francisco Valdomiro Lorenz, la unua esperantisto en Brazilo, fondiĝis la "Grupo Esperantista FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ". Estis akklamita honora prez. s-ro Ismael Gomes Braga. La organiza komitato konsistas el s-roj Lauro V. Borges, Armindo Vaz Pereira da Silva, José Augusto Henriques kaj Nilo Pinto da Silva. La klubo, kies adreso estas — Caixa postal 777, intencas filiigi al nia Ligo.

MINAS GERAIS. Belo Horizonte. — La 3an de Februaro lasta la Grupo Esperantista "Humberto de Campos" elektis novan estraron, kiu konsistas el s-roj Oscar Dias Vieira — prez., Ozanam Gomes — sek. kaj Misael Alves Mendes — kasisto.

MATO GROSSO. Cuiabá. — Pere de nia samideano d-ro Benjamin Camosato ni eksciis, ke estas nun estro en tiu ĉefurbo s-ro Manoel Miraglia, kiu bone lernis Esperanton kaj estas fervora filetelisto. Li posedas la plej belan kolekton de poŝtmarkoj en la ŝtato. Niajn varmajn salutojn!

RIO-DE-JANEIRO. — Okaze de la disdono de l' Atestoj pri Lernado al la aprobitoj en la ekzameno okazinta ĉe la sidejo de Brazila Klubo "Esperanto", unu el ili, s-ro Aldino de Freitas, salutis la instruanton, s-ron A. Couto Fernandes, kaj donacis al li en ilia nomo belan memoraĵon, kiun tiu dankis. La nova kurso daŭras kun entuziasmo.

La gazeto "Juventude Unida" (Unuigita Junularo), oficiala organo de la Brazila Ĉapitro de la "Internacia Societo de Studentoj", kies prezidanto, d-ro N. Crowell, loĝas en Was-

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Relação dos membros mais antigos da LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA que, tendo números de matrícula inferiores a 200, ainda pertencem ao seu quadro social:

- 1 — Dr. Everardo Backheuser, **presidente honorário.**
- 2 — Eng. Alberto Couto Fernandes, **pres. perpétuo.**
- 3 — Dr. João B. de Melo e Souza, **benfeitor.**
- 4 — Eng. Hernani da Mota Mendes, **sec. geral.**
- 5 — Snr. Edmundo Felix Tribouillet.
- 6 — Coronel Lauriano das Trinas.
- 7 — Snr. A. Caetano Coutinho, **o mais antigo esp. brasileiro.**
- 11 — Eng. Henrique E. Couto Fernandes.
- 13 — Snr. Ismael Gomes Braga, **benfeitor.**
- 14 — Dr. Leonel Gonzaga da Fonseca.
- 15 — Dr. Venancio da Silva, **vice-pres. honorário.**
- 16 — Snr. Odilo Pinto, **tesoureiro.**
- 18 — Snr. Flavio Norte.
- 20 — Snr. Arminio de Moraes.
- 29 — Snr. Targino Soares — **Mossoró.**
- 30 — Snr. Maestro Murilo Furtado, **pres. hon. do BKE.**
- 34 — Sta. Irani Baggi de Araujo, **2ª Secretária.**
- 35 — Sta. Aracé Baggi de Araujo.
- 37 — Capitão João Atanasio Batista.
- 40 — Dr. Manuel C. Peregrino da Silva, **membro hon. do BKE.**
- 41 — General José A. Silveira Sobrinho.
- 43 — Carlos Guimarães Domingues, **vice-presidente.**
- 50 — Dr. Teofilo de Almeida.
- 61 — Paulino Santiago — **Maceió.**
- 70 — Sta. Haidéa Ferreira.
- 77 — Snr. Ary Zamora — **Porto Alegre.**
- 80 — Dr. Luiz da C. Porto Carreiro Neto.
- 82 — Snr. Hieronides Taciano Bellez.
- 89 — Snr. Carlos B. da Costa Leite.
- 92 — Dr. Viterbo de Carvalho.
- 129 — Snr. Jaime Martins de Souza — **Juazeiro.**
- 144 — João Pereira de Siqueira — **Natal.**
- 162 — Dr. Mario Teixeira de Freitas.
- 168 — Snr. Carlos de Souza Cunha — **Alagoinhas.**
- 175 — Dr. Arsenio Moreira da Silva — **Sant'Ana do Ipanema.**
- 181 — Sr. Alexandre Emilio Sommier.
- 189 — Eng. Agenor Augusto de Miranda.
- 194 — Snr. José Gomes Braga — **Ubá.**

Curso por correspondência

Peçam informações à

"Brazila Ligo Esperantista"

hington, malfermis fakon por la propagando de Esperanto. Ĉiu korespondado devas esti sendata al ĝia direktoro, s-ro Neyzir de Almeida Couto, Rua Bom Pastor, 60. Rio-de-Janeiro.

AMERIKA ESPERANTISTO

MONATA BULTENO DE LA ESPERANTO — ASOCIO DE NORDA AMERIKO

1410 H. Street, N-W. Washington, D. C. Usono.

Majo 1941

Gratulas la Prezidanto de la Esperanto - Asocio de Norda Ameriko:

Jen aperas jam la dua numero de la TUTAMERIKA NUMERO de la diversaj naciaj Esperanto-Asocioj de la Amerikaj Kontinentoj!

Mi povas nur plej sincere gratuli la brazilajn gvidantajn gesamideanojn pro la bonega unua numero, kiu plaĉis al ĉiuj usonaj gesamideanoj. Mi ricevis nur laŭdojn el ĉiuj partoj de Usono. Tiel ĉiuj laborantoj en nia movado ricevas bildon pri niaj progresoj en ĉiuj partoj de Ameriko. Por ni en Usono la unua numero donis novan kuraĝon kaj instigon.

Mi jam de kelkaj jaroj konis la nomojn de la fidele laborantaj gesamideanoj sude kaj norde de Usono, sed tio ne sufiĉis. La Tutamerika Numero montras al ĉiuj membroj de EANA ke en Suda Ameriko nia movado floras kaj progresas — eĉ pli bone ol en Usono.

Bedaŭrinde niaj landoj estas tiom grandaj kaj do tiel malproksimaj unu de la aliaj ke ni ne povas aranĝi sukcese Tutamerikajn Esperanto-Kongresojn. La kostoj por vojaĝado al tia kongreso estus multe tro granda por la poŝtoj de amerikaj gesamideanoj. En Eŭropo, kie la landoj estas malgrandaj, vojaĝado al eĉ ekstrema angulo de Eŭropo kosta malpli ol vojaĝo al Mezamerika urbo. Kaj al tiuj "Universalaj Kongresoj" en Eŭropo ofte venis nur deko da gesamideanoj el aliaj kontinentoj. Des pli ni usonaj gesamideanoj kun granda ĝojo ricevis la viziton de izolaj gesamideanoj el aliaj partoj de Ameriko. Ni ĝoje gastigus ilin okaze de ilia vojaĝado tra Usono. "Niaj hejmoj estus iliaj hejmoj" laŭ Sud-Amerika kutimo. Kiu venos unue?

Mi mem kaj mia nova edzino Heleno Scherer, kasistino de la Los Angeles Esperanto-Klubo jam de post nia geedziĝo en Septembro parolis pri la ebleco viziti la Esperanto-Klubojn de Mez- kaj Suk-Amerikaj landoj. Kiel fraŭlo mi vojaĝis kaj vivis jam en 48 landoj en kvar kontinentoj, sed tre bedaŭrinde mi neniam estis en Suda Ameriko. Mi rezervis tiujn sudajn landojn por miela-luna vojaĝo, sed inter-

tempe venis la terura milito. Dume ni avide legas pri viaj landoj kaj en la Tutamerika Numero ni pli kaj pli interkonatiĝas kun via agado kaj kun viaj ĉefaj kunbatalantoj en nia paca movado.

Joseph R. Scherer, L. K.

LA JUNULARA KOMITATO DE E. A. N. A.

Elstare vigla kaj agema inter la daŭraj komitatoj starigitaj de EANA estas nun la Junulara Komitato, kies esuro estas meze juna instruisto en la lernejoj de Winchester, (Illinois,) S-ro George J. Falgier. Liaj kunlaborantoj en la komitato estas F-ino Doris Tappan kaj S-ro A. Connor, ambaŭ en Novjorko. La komitato redaktas kaj eldonas naŭfoje ĉiun jaron (monate, sed ne en somero,) gazeton multegrafitan de 8 ĝis 10 paĝoj, kun la nomo, "ESTU PRETA." La nomo estas mem la devizo de la skolta movado. Sed la gazeto estas por ĉiuj, ĉu skoltoj aŭ ne.

La teksto estas en Esperanto, sed ĝenerale kun angla traduko en flankaj kolonoj, por helpo al izoluloj kaj komencantoj. La celo estas interesigi kaj instrui neesperantajn infanojn kaj gejunulojn; do simplaj gramatikaj klarigoj abundas; kaj por plua helpo kaj plua intereso, multaj simplaj desegnaĵoj aperas por klarigo. Ili estas verkitaj de la mano de l' komitatestro.

La deka numero, aperinta en Januaro, 1941, estas escepto, je formo kaj enhavo. Ĝi estas libreto, enhavanta pli ol dekduo da poemoj, ĉefe pri temoj precipe interesaj al gejunuloj, verkitaj de S-ro Hugh Irvin Keyes, malnova Esperantisto kies poezia talento gajnis por li la titolon, Poeto Laŭreato Esperantista de Usono.

La Junulara Komitato tre deziras ke gejunuloj en Suda Ameriko, aŭ en la mezaj amerikaj regionoj, sendu nomojn kaj adresojn, por ke amika korespondado povu ekesti inter ili kaj usonaj gejunuloj kiuj ricevas kaj legas "ESTU PRETA." Pri tiu celo, la oka numero de ESTU PRETA enhavas la jenon:

"ESTU PRETA havas nur du ce-

lojn: la unua, allogi vin, la junulojn kaj junulinojn de Usono, al la studo de Esperanto; la dua, ebligami kontakton inter la usonaj kaj la eksterlandaj gejunuloj. TROVU AMIKON EN SUDA AMERIKO. Je la pasinta tempo, ni usonanoj ne faris multon por gajni amikecon de Sud-Ameriko. La ĉefa barilo inter la du Amerikoj estas la lingvaj diferencoj. Oni diras, ke usonanoj devus lerni la hispanan kaj la portugalan lingvojn; sud-amerikanoj devus lerni la anglan. Al la plimulto en la du regionoj tio ne estos oportuna. La plej oportuna solvo estas Esperanto. Ĉiu povas lerni ĝin sen granda ĝeno aŭ elspezo. Post mallonga studado, oni povas legi kaj skribi leterojn, kaj komenci korespondon kun novaj ge-amikoj trans la limoj de la lando."

Kiam oni skribos en respondo al tiu ĉi alvoko, sufiĉos adresi la leteron aŭ poŝtkarton al:

"ESTU PRETA, Winchester, Ill., (U. S. A.)"

LA EDUKADA VALORO DE ESPERANTO

Esperanto venkos, kompreneble ne sole per unu ajn valoro sia, eĉ la plej grava, sed per la kuna efiko de siaj multaj kaj diversaj utilecoj — en turismo, en komerco, en literaturo, en radiofonio, en lumbildoj, kaj precipe en korespondado, grava en la idealista afero de interfratiĝo de homo kun homo. Eĉ kroman valoron, tre imponan, ĝi havas kiel ilon por vekti la logikajn povojn de la lernanto kaj por pli klare komprenigi al li la gepatran lingvon. S-ro Ernest Dodge (estro de la Aga Komitato, EANA,) verkis kaj publikigis en la Januaro-1941-numero de la usona gazeto "Education" en Bostono, artikolon (kompreneble anglalingvan) de 4500 vortoj, titolitan: "Esperanto, ilo por Mensa Plibonigado." Ĝi nombras ok manierojn en kiuj Esperanto servas, eĉ pli bone ol la studo de aliaj lingvoj, por intelektaj celoj de klerigado. La oficejo de EANA povas sendi represajon kontraŭ respondkupono.

GENERALA SEKRETARIO DE
E. A. N. A.

LA SONORILOJ

De Edgar Allan Poe.



S-ro Joseph Lèahy

S-ro Joseph Lèahy, (pr. "lejhi"), kies portreto troviĝas supre, estas, de 1934 ĝis nun, la senlaca kaj sindona Ĝenerala Sekretario de EANA. Li spertis jam 72 jarojn de vivo laborplena kaj tre diversflanka. Naskiĝinte en la kanada provinco Quebec, en kampara kaj arbara regiono, el irlanda patro kaj montarskota patrino, li lernis en la hejmo la gaelan lingvon. Ekster la hejmo li parolis, kiel knabo, la lingvojn francan kaj algonkinan (indianan), nur malmulte la anglan. Eklaborinte tre juna kiel dungita farmlaboranto, li povis ĉeesti lernejon nur tri tagojn en la vivo. Do li fariĝis meminstruitulo.

Kiel juna viro, li estis sukcesa kaj fame konata vetkuristo je la biciklo. Transmigrante en Usonon, li fariĝis lojala usona civitano, kaj laboradis en diversaj komercaj entreprenoj. Poste li fariĝis mem sukcesa komercisto, je partoj de aŭtomobiloj kaj kaŭĉukaj radringoj. Sed la granda milito kaj la interrompo de normalaj komercaj kondiĉoj poste ĉesigis la negocon.

Unue en la Hispan-Usona milito de 1898, kaj poste duafoje en la grandmilitaj jaroj 1917-18, li multe servis al la usona registaro en konfidencaj kaj sekretaj postenoj. Ankaŭ en pluraj soldattendaroj li helpis je la sagniga amuzado de l' novaj rekrutoj, per sia talento rilate al deklamado de rakontoj kaj poemoj en la modifitaj anglaj dialektoj, laŭ la parolmanieroj de skotoj kaj de francdevenaj kanadanoj. Li havis talenton ankaŭ por belarta buŝa fajfado — kiu talento estis poste silentigita per alpreno de artefarita dentaro! Kiel komerca fotografisto li

El la poeziaj verkoj de tiu tre talenta sed ofte malgaja usona verkisto (1809-1849) la du plej famaj estas "La Korvo" kaj "La Sonoriloj". *La Korvo* aperis en Esperanto, jam en 1931, per la lerta traduko de K. Kalocsay en lia volumo "Eterna Bukedo". *La Sonoriloj* estas belarta studo en sonoj kaj en emocioj. Profesiaj voĉartistoj ofte

deklamas ĝin, kun frapa efiko, helpate de la tonkapabloj de la ofte ripetata angla vorto "bells" (pr. "belz"). Pro la malsimileco, je longeco kaj sono, de la vortoj "bells" kaj "sonoriloj", la finaj dinioj de ĉiu strofo estas tradukitaj iom libere, ne laŭvorte sed laŭ artista kaj spirita intenco.

— I —

Jen! sledĉevalara sonorilar' —
 Argentaj sonoriloj!
Kian vaston da gajeco vekas jenaj etsonoriloj!
 Ili tintosone tintas
 Nokte sur la frosta voj' —
Dum la steloj, kiuj milas
Sur ĉielo, nun trembrilas
 En kristala ega ĝoj' —
Ritmosone, kiel feino,
En Nordlanda Runa rimo,
Ĉe la tintosontintado kiu ĉarmatone svelas
 El la sonoriletaro,
 Belsoneta sonorilaro:
Son-tintetado, ton-tintetado gaje tra vintra la nokto helas!

— II —

Jen! geedziĝhora sonorilar' —
 Orlipaj sonoriloj!
Kian vaston da feliĉo bildas jenaj molsoniloj!
 Tra balzama noktaero
 Bela sonar' de gojespero
 Ore glorie tremflosadas,
 Ĉio en unu!
 Kia fluson' fluide adas
Al turtino aŭskultanta, sopiranta
 Je la luno!
 El ĉeloj rondaj, sonmurmuraj,
Tree belsona eliro nun de tonoj molveluraj.
 Ili svelas,
 Ili ŝvebas
Sur l' estonto, profetante
 Feliĉegon. — allogante
Per ŝvingado kaj sonado
 De la gloraj sonoriloj,
 De la floraj sonoriloj,
Dum fluado, harmoniada de l' sonoraj oraj iloj!

— III —

Jen! fajraverta sonorilar' —
 Bronzfaŭkaj sonoriloj!
Kia de terur' rakonto, ek! el ties raŭkobriloj!
 En oreton de la nokto
 Falas ties timoplekto.
 Stoniginte, ne parolas —
 Ili nure hurlas, *hurlas*,
 Malagorde,
En bruvoĉa petegado al kompato de la fajro,
En ekscita perpetado al la surdfreneza fajro.

laboras eĉ nun — kiam lia entuziasmo por Esperanto, tion permesas.

Esperantiginte antaŭ tridekdu jaroj, li kore trezortenas la memoron, ke unufoje en 1910 li ekvidis la majstron, D-ron Zamenhof, en la stacidomo en Washington, sed nur momente. Lia ĉefa servo en la Esperanto-movado ko-

menciĝis en 1934, kiam oni elektis lin al la plej laborplena posteno en la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko. Al la devoj de tiu ofico li dediĉas sin, ĝis nun, malŝpare kaj senlace, en plena kredo ke Esperanto estas ja granda kaj gravega fonto de espero por la tuta nun malgaja mondo.

Saltas pli la fajrdeliro
 Furioza pro deziro,
 Furiozante ĉiam, ĉiam,
 Nun eksidi — nun se iam —
 Ĉe pala la lun' -- fratorde.
 Ho! sonaĉ'! fison'! sonoro!
 Kia regno de teroro
 Kaj malesper'!
 Ili krias, bruas, brutas:
 Teruregon ili ŝutas,
 Sur bruston tremegantan de l' aer'!
 Sed orelo — ĝi ekscias
 Per tintado —
 Aŭ tondrado —
 Kiel danĝero falas, plias.
 Ni aŭskulte ekkomprenas
 En remuĝo —
 Kaj sonskurĝo —
 Kiel danĝero grandas, svenas.
 Per svenado aŭ svelado de l' kolero de l' sonorilar' —
 De l' bru-bru-brua sonorilar',
 De l' hurlegaĉaj sonskuaĉaj
 Iloj de la tonmuĝaĉoj, —
 Per tremblado kaj tondrado de l' bronzkora sonorilar'!

— IV —

Jen! mortfunebra sonorilar' —
 Fergorgaj sonoriloj!
 Kia vasto da penstristo fontas el la vibradmiloj!
 En silento de la nokto
 Tremas ni en timolukto,
 Pro averto de ilia trista voĉ'.
 Ĉar ĉiu son' elfaŭka,
 Pro gorga rusto raŭka,
 Ve-ĝema estas ton'.
 Sed la uloj (ha! teruro!)
 Logantaj alte en la turo,
 (Soleca ties voĉ'!)
 Sonsonante en sonado,
 Je obtuza monoton',
 Sentas gloron en rulado
 Sur la koron de peza ŝton'.
 Ha! nek viroj nek virinoj,
 Brutoj nek, nek homkombinoj!
 Ili estas ja vampiroj —
 Kies Reĝo, per batiltiroj,
 Funebriĝe taktas tempon,
 Vemuzikon kororompan.
 Batas li per sonbatiloj
 Glorokanton el sonoriloj.
 Gajabruste svelas li
 Dum glorkanta harmoni';
 Dancas li, fihurlas li,
 Tempbatante en esprimo
 De Pranorda Runa rimo;
 Glorkantante je la sonoj
 De la tonoj.
 Tempsonadas li ĝis limo
 En kvazaŭa Runa rimo,
 Je tremblado de la ton',
 De la ton'... ton'... ton'!
 Je muĝado de la ton'... ton'... tono!
 Tempmezure, korterure,
 Kantas li pri mortoŝimo
 En figaja Runa rimo,
 Dum rulado de sonor'.
 De sonor'... 'or'!... 'or'!
 Dum Runado de la iloj de sonor' —
 De la son'... son'... sonor'!
 Son'... sonor'! Ĉu inferfaŭka boj'?
 Dum ĝemado, vemuĝado... (ton'!)... de l' sonoriloj — — —oj!

(Tradukis ERNEST DODGE, en la urbo Washington.)

la kanada urbo, Toronto.) Oni esperas ke Oklahoma City, estante egale distanca de la atlantika kaj pacifika marbordoj, montros sin pli oportuna por kunen-tirado de samideanoj el ambaŭ marbordaj regionoj de la vestegala lando, kiuj, pro distanco, tro malofte povas sin reciproke renkonti.

KRISTNASKA EKTAGIĜO
 INTER MONTOJ

de WILL J. MEREDITH
 Edukisto en Kalifornio.

Gigante staras la purpura monto
 Sur fono travideble orkolora
 De l' ektagiĝo; en la lumo glora
 La steloj dronas; el mistera fonto
 De miaj revoj kvazaŭ ferakonto
 Sin levas strangaj bildoj, dum aŭrora
 Malvarma dolĉa vento bonodora
 Apenaŭ plu ĉe mia doma fronto

La foliaron movas. Sunradioj
 Min banas nun. Ĉu en Judeo foje
 Maten' simila paŝis sur l' abioj
 De l' montoj, kaj ĉu dormantino ĝoje
 Vekiĝis post angoro travivita,
 Gojante pro la Tago Promesita?

Esperantigis el la angla Fred L. Wharff.
 (Nova adreso de l' tradukinto estas, Kaweah,
 Calif., U. S. A.)

EBLE NUR SPRITAJO — SED
 BONEFIKA

S-ro Ernie Pyle (pr. "arni pajl") estas multe legata usona raportisto, kiu nun estas en Anglujo, kaj priskribas tago-post-tage la tieajn okazantaĵojn kaj la sintenon de la popolo. Lia stilo estas interesa, informiga, kaj iam amuza. Raportante intervjuon kun Lordo Beaverbrook, registara ĉefo por aviadaj aferoj, li priskribas lian moŝton jene: "Estas por li kutimaĵo paroli samtempe al kvar-kvin personoj pri diversaj temoj. Li estas kolosa demandante de demandoj. Antaŭ ol iu ajn povas eksidi, li eklernas de li ĉu li fumas, drinkas, pugnobatalas, naĝas, aŭ parolas Esperante. Almenaŭ tion asertas ĉiu pri li. Sed laŭŝajne li opiniis ke mi ne havas multe da scio — estu ĝi kia ajn — ĉar min li ne multe sondis per demandoj."

S-ro Pyle estas sprita kaj ofte ŝercema; do bonvolu ne kompreni la diraĵon tro laŭlitere — kvazaŭ Lordo Beaverbrook fakte aldemandas ĉiun pri Esperanto. La intenco de Pyle verŝajne estas nur klarigi ke la ministro ĵetas multajn demandojn al ĉiu nova intervjuonto. Tamen milionoj da homoj legas en la gazetaro la artikoletojn de Ernie Pyle, kaj povas noti la respektplenan aludon al "nia kara lingvo."

KONGRESO ĈI-JARA DE USONAJ
 ESPERANTISTOJ

La 34-a ĉiujara kunveno aŭ kongreso de EANA okazos de la 4-a ĝis

la 6-a de Julio, 1941 en Oklahoma City, ĉefurbo de la ŝtato Oklahoma. Antaŭaj kongresoj, de 1933 ĝis 1940, okazis multe pli proksime al la atlantika marbordo; (unu en 1934 estis en

ARGENTINA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE ARGENTINA ESPERANTO — ASOCIO

Redakcio kaj Administracio: Misiones, 369. Buenos Aires. Argentino.

Marto-Aprilo. 1941. N-ro 181-182

NIA AFERO MARŜAS

Kiam komenciĝis la nuna eŭropa tragedio, multaj samideanoj ektimis ke nia afero, perdinte la plej firman terenon de sia ekzisto, pereos aŭ almenaŭ falos por ioma periodo. Tamen la esperantistaro en kelkaj amerikaj landoj ĝustatempe ekkonsciis ke alvenis la tempo por preni sur siajn ŝultrojn ne nur la vivtenadon, sed ankaŭ la antaŭenpuŝon de la movado, kaj ke ni respondecas pri ĝia estonto. Inter tiuj landoj, fiere ni deklaras, estas ankaŭ Argentino. Kaj kion ni faras por la movado?

KONGRESO. Dum la tagoj 11-a, 12-a kaj 13-a de aprilo okazos en Rosario la unua kongreso de la argentina esperantistaro. Do en tiu ĉi lando, kie oni trovas la postsignojn de la unua esperantista grupo jam en la jaro 1889 — du jarojn post la eldono de la unua gramatiko — 52 jarojn poste, dum tiu ĉi monato kunvenos la unuan fojon la reprezentantoj de la tuta esperantista popolo en granda landa kongreso. Al tiu kunveno, kiun ni konsideras historia por nia movado, jam anoncis sian ĉeeston preskaŭ cent gesamideanoj.

ARGENTINA ESPERANTO-LIGO. Unu el la ĉefaj punktoj de la programo dum la menciita landa kongreso estas la kreado de unueca landa organizo, la Argentina Esperanto Ligo (A. E. L.). Ĝis nun tia organizo ne ekzistis, kvankam la Argentina Esperanto Asocio de Buenos Aires iamaniere interrilatis ĉiam kun la enlandaj samideanoj, kaj ankaŭ multfoje antaŭ la eksterlando reprezentis la landan movadon. Sed tiu ĝia agado estis tute libervola, ekster ĝia statutaro. Ĝuste pro tio, tiu interrilato estis multfoje improvizita kaj sufiĉe efika, kaj tamen pro tiu agado la estraro multfoje estis devigata malatenti la evoluon de la esperanto-vivo en la ĉefurbo mem.

Nun ni decidis dividi la taskojn de la ĝisnuna A. E. A. en du partoj: pri la ĉefurba esperanto-vivo zorgos la komitato de la "Esperanto Grupo de Buenos Aires" — ĉar tio estos eble la nomo de la ĝisnuna A. E. A., kaj pri la landa movado kaj kontakto kun

eksterlando zorgos A. E. L. (Argentina Esperanto Ligo) — kio estos la verŝajna nomo de la landa organizo.

La kreadon de tiu nova organizo salutis la tuta somideana popolo en la lando, esprimante la esperon ke ĝi signifos novan epokon en nia movado.

Por eviti eventualajn miskomprenojn ni samtempe sciigas, ke tiu ŝanĝo efektiviĝos en plena akordo kaj kun sento de ĉiuj samideanoj en la lando, kaj sen ia ajn alia motivo ol la praktikaj kaŭzoj.

ESPERANTO-SEMAJNO. La alvoko de la usonaj samideanoj por aranĝi esperanto-semajnon alvenis ĝustatempe, ĉar ni ĉiumaniere intencis ĝin aranĝi. Kiel estas konate, ĝi okazos dum la semajno de la 20-a ĝis la 26-a de aprilo. Dum tiuj tagoj ni klopodos okazigi prelegojn pri Esperanto en ĉiuj eblaj ejoj, aperigi en ĵurnaloj kaj revuoj grandan nombron da sciigoj, kaj cirkuligos multajn afiŝojn kaj flugfoliojn.

Tuj post tiu semajno ni malfermos kursojn, buŝajn kaj korespondan, en la ĉefurbo kaj multaj aliaj lokoj de la lando.

Ankaŭ al la grupoj, samideanoj kaj lernantoj el aliaj landoj, precipe hispan-amerikaj, ni tre volonte helpas per materialo, konsiloj kaj ĉiuspeca instigo.

Jen kion ni faros dum la monato aprilo de tiu ĉi jaro, kaj ni esperas grandajn rezultojn. La ĵus komenciĝintan laboraron ni dediĉos ĉefe al la organizo de la landa movado, al la aktivigo de la grupoj en la enlando kaj al fondado de novaj grupoj. Tial ni nomos la jaron "ORGANIZA JARO".

Tibor Sekelj.



INTERNACIA
LINGVO

1^a.

ARGENTINA ESPERANTISTA KONGRESO

Por informo
Kongres-Sekretario,
Suipacha 727
Telefono 93620

ROSARIO
11, 12 kaj 13 de Aprilo
1 9 4 1

LA LOKA KONGRESA KOMITATO
(L. K. K.)

(OFICEJO: — 25 de DICIEMBRE, 1020)

Prezidanto: — S-ro Wilfred M. Goodes,
Jujuy 1439 F.
Sekretario: — S-ro Pedro Martín,
Suipacha 727,
Help-sekretario: — S-ro Alberto Mántica.
Kasisto: — S-ro Enrique Ebrero,
Voĉ-donantoj: — F-ino Paquita Martín,
S-ro José Carmona,
S-ro Julio Córdoba.
S-ro Buenaventura Dos.
S-ro Francisco Gómez,
S-ro Salvador Heredia,
S-ro Ricardo Sartoris.

ROSARIO — ESPERANTO- KURSOJ

Sub la gvidado de S-ro W. M. Goodes kurso por komencantoj okazos ĉiumarde en la lernejo "Rosalia de Castro." Estas ĉirkaŭ 50 gelernantoj en la kurso, kaj, laŭ la regula ĉeesto de la plimulto, verŝajne ĉiuj plene interesiĝas kaj faras bonegan progreson. Espereble en la kongreso vidiĝos la rezulto de ĉi tiu kurso.

Ankaŭ S-ro Goodes gvidas kurseton por pliprogresintoj por ekzercigi ilin en la pli facila uzo de la lingvo.

L. T. 1. RADIO DEL LITORAL DE ROSARIO

TODOS LOS MIERCOLES

A LAS 15.15 HORAS

BOLETIN ESPERANTISTA
Información del Movimiento Esperantista Mundial

SE MI VIVUS SUR IZOLITA INSULO

de *Conrado Nalé Roxlo*

Conrado Nalé Roxlo estas fama argentina poeto, ĵurnalisto kaj humoristo. Li naskiĝis en la jaro 1898 en Buenos Aires. Lia plej konata verko estas la libro de poeziaĵoj titolita "Grillo" (Grilo) kun la antaŭparolo de Leopoldo Lugones, libro duoble premiita, kaj poste lia alia poeziaro "Claro desvelo" (Klara maldormo). Krom lia poeta aktiveco li estas kunlaboranto de diversaj ĵurnaloj. Plej multe da populareco li atingis per sia humorista kunlaborado en la tagĵurnaloj "Crítica" kaj aliaj, sub la pseŭdonimoj "Alguien" (iu) kaj "Chamico". Dum tiu ĉi jaro li verkis sian unuan teatraĵon: "La vosto de la sireno", kiu estos prezentata dum tiu ĉi sezono en Buenos Aires.

Nalé Roxlo tre simpatias kun la esperanto-movado.

Dum iu konversacio kun la fama verkisto mi eldiris la opinion, ke en la hodiaŭaj cirkonstancoj eble estas plej bone vivi en la oceano sur izolita insulo. Kiam mi vidis lian heziton aprobi miajn vortojn, mi demandis lin:

— Kiel vi imagas la vivon sur izolita insulo?

— Lasu min pripensi la aferon — respondis li. Morgaŭ mi respondos al vi.

La sekvintan tagon li transdonis al mi la suban respondon, kiu estas tuta literatura verketo, kaj mi konsideris ĝin tradukinda.

— Kiel mi imagas mian vivon sur izolita insulo? Laca kaj kun kapdoloro, ĉar tio okazis al mi ĉiam, kiam mi havis la malbonan ideon ĉeesti iun piknikon. Kaj la vivo sur izolita insulo devas esti tio, pikniko notinde pli grandigita, kun ĝiaj dubaj avantaĝoj kaj ĝiaj multaj kaj certaj malavantaĝoj. Ĉe ĉiu normala pikniko oni forĝas almenaŭ jenajn tri aĵojn: kortirilon, salon kaj alumetojn. Estas vere ke neniam mankas elturniĝema homo inter la ĉeestantoj, kiu scias ke ŝtopitan botelon oni povas igi malplenebla rompante ĝian kolon kontraŭ arbotrunkon; ke la salon oni avantaĝe anstataŭigas renversante la rostaĵon en la cindron kaj ke oni povas ricevi belan fajron frotante du lignopecojn. La rezulto de tiom da praktikaj konoj estas ke la vino elverŝiĝas, aŭ estas tiom plena de vitreroj ke neniu, krom ia sinmortiĝema hundo, kuraĝas

trinki ĝin, ke la rostaĵo estas nemangebla, ĉar krom tio ke ĝi havas la melankolian guston de estingita fajrego, ĝi estas kruda, la frititaj lignopecoj ne donis fajron. Kaj ĉio ĉi kaŭzas al mi grandan lacigon kaj kapdoloron. Kaj fine, tiel ke la situacio de ŝpironulo estas la sama pligravigita, ĉar oni forĝis ankaŭ la korbun plenan de pasteĉoj, paska torto kaj ceteraj nutraĵoj (vidu "Robinson Crusoe") kaj krome li falis sur la izolitan insulon kontraŭ sia volo, ĝuste kiel mi iris ĉiam al pikniko, la bildo ne povas esti pli simila. Pro ĉio ĉi kaj sur la bazo de miaj spertoj, mi povas certigi ke sur izolita insulo mi vivus lace kaj kun kapdoloro, kun la malavantaĝo kompare kun la vivo dum pikniko, ke mi ne havus kamaradojn proksime, por ŝargi sur ilin la kulpon pri la malbona organizo.

Tradukis Sek.

HORACIO QUIROGA

La kritikistoj emas kompari H. Quiroga-n (elp. Kiroga) kun Kipling kaj Jack London. Kaj konsideras lin la plej granda rakontisto en Latina Ameriko.

Quiroga pasigis la plej grandan parton de sia vivo en kontakto kun la granda naturo, ĉe la arbaroj kaj grandaj riveroj de Misiones, argentina teritorio inter Brazilo kaj Paragvaĵo. Tie li verkis siajn plej bonajn rakontojn.

La ĉi sube tradukita verkaĵo estas unu el la lastaj verkitaj antaŭ lia morto. Ĝi eble ne estas entute "rakonto", sed montras la lertecon de Quiroga prezenti sub rakonta vesto ekonomipolitikan temon.

H. Q. naskiĝis en la jaro 1878 kaj mortis en 1937.

J. H.

LA MALSATAJ HOMOJ

de *Horacio Quiroga.*

— Tiu ĉi situacio — diras la malsata homo montrante siajn ripojn — devenas de miaj grandaj riĉaĵoj. Tiel estas. Mi ne paradoksas. Nek antaŭe, nek poste. Nun mem per tio kio al mi superfluas por vivi — ĉu vi bone komprenas? — mi povus elŝiri el la tombo la milionon kaj duonon da sinmortigintoj pro malsato en 1933. Per tio, kio troas al mi por vivi. Kaj mi mortas pro malsato.

Ni pli atente rigardis la parolanton.

Fakte li troviĝis en terura stato de malgraseco. Sub lia ĉemizo li montris al ni siajn ripojn, dum li observis nin kun freneza mieno. Intensa fajro de ekscitiĝo lumis en siaj okuloj de malsatanto, kaj la vortoj eliĝis kun rapido el lia buŝo...

Ni ne scias de kie li venis, eble el la fundo de la arbaro, kie li kaj kelkaj kamaradoj iris, por kulturi la teron. Dum longa tempo nenion ni sciis pri ili; oni supozis ilin prosperaj. Kaj jen li troviĝas denove antaŭ ni, nur li, vestita per nura pantalone kaj ĉemizo, kiun li levis per tremanta mano. Tiel estas — li daŭrigis post longa paŭzo, per kiu li ŝajne donis al ni sufiĉan tempon por prijuĝi ĝis la kerno lian situacion.

Per tiu, kiu troas al mi por vivi, li diras, mi kaj miaj kunuloj povus feliĉigi la saman kvanton da mizeruloj. Manĝi, manĝi! Ĉu vi komprenas? Tie ili estas, spionante unu la alian de la supro de siaj riĉaĵoj, dum ili mortas pro malsato, kaj ĉiu sidanta sur piramidoj da maniokoj, kiuj putriĝas pro malsekeco, kaj brakumante banangrapolojn, kiuj dispremiĝas sub iliaj fingroj.

Tiel estas. Ni estis dek, kaj ni instalas nin en plena arbarego por dishaki, faligi, senradikigi, purigi — la tuta sekvo da arbaraj laboroj — kun tia kuraĝo kaj laborpovo por kontentigi nin, kian oni ne plu revidos ĉe dek homoj, kiuj tiacele foje interniĝis en la arbaron. Tiel estas.

Kia kuraĝo, amikoj! Fajreroj el energio kaj persisto ŝprucis el la fosiloj! Kaj el la honestaj koroj, ankoraŭ pli da fajreroj!

Je la fino de la unua somero ni estis liberaj. De neniu ni dependis, kaj ni hisis la grandan flagon de la akirita bonstato, malsekan de ŝvito.

En tiu fundo de la arbarego ni reprezentis la homan specon. Niaj individuaj hakiloj estis ja nur unu granda hakilo manuzita de dudek homaj brakoj. Tial ni estis fratoj; ĉar ĉe la batoj de tiu hakilo dek brustoj resonis kun la sama, ĝusta, tremiga kaj triumfa stertoro!

Sed ne ĉiuj kune. Ĉiu eltiris el la tero la frukton de sia aparta parcelo kaj kun la produkto de ĉiuj ni formis la grandan solidaran bonstaton.

Mi rikoltis maniokojn, kaj nur maniokojn, ĉu vi komprenas?, ĉar mia tero estis sendanka rilate al ĉia alia kulturo. Kaj jen la alia rikoltis nur maizon, kaj la alia nur bananojn. Kaj tiu, nur sojon. Kaj tiu alia mandarenajn. Tia estas la kondiĉo de tiuj neregulaj teroj. Kial pretendi per malfacila laboro sur ni propra

tero havi tion, kion la najbaroj ricevas facile ĉe la sia?

Ni, kompreneble, interŝanĝis niajn produktojn. Mia manioko nutris la alian, kaj la bananoj de tiu alia vivtenis nin.

Sed, kia abundo! Ĉu vi scias — li aldonis montrante sian ventron — kio signifas esti bone nutrita, kun rekta konscienco, kaj tiu ĉi konscienco kaj la animo kaj la fortika pugno magne- te altirita al la paco? Tiaj ni estis. Nun restas nur ŝifonoj, kaj mi, nenio alia ol mizerulo.

Protektantaj sunoj! Ĉiu arde batalis por sia propra rikolto. Sia propra, sed kiu estis ĉies, ĉar ni interŝanĝis la produktojn.

Jaluzo? Ho ne! Benata estis la pluvo, kiu egale malsekigis la dek parcelojn! Sed fiero pro tio ke ni kontente vivis, ke ni povis preni, trans la unue renkontita heĝo la manon de egalulo.

*
* *

Iun tagon falis, kiel fulmo, la orĝojlo sur la malseketan teron. Ni volis individue riĉiĝi.

Ĉu vi vidas la situacion, sola, ĉiu izolita en sia angulo, fruktodona nur por aparta kulturo, sed ne taŭga por aliaj, ĉiu el ni apenaŭ valoris mortanton. Ekzakte: la dekonon de sana homo. Antaŭ la nova dogmo, iu tiam ekkriis:

— Sed tio estas frenezaĵo!. Ni malriĉiĝos ĝis mizero se ni tiel faras!

— Ĉu mizero? — Oni respondis — Mizero estu la parolinto! Tute kontraŭe, ni estos superŝutataj per riĉaĵoj. Ĉiu devas esti memsufiĉa, ŝuldan- te nenion al neniu. Tia estas la leĝo. Sed aliaj kontraŭdiris:

— Malsata, milfoje malsata iĝos la homo kiu intencas spekulii pri la necesajĵoj de la najbaroj! Kia frenezo falis sur la planedon? Kie oni povas trovi la originon de tiu ĉi epidemia eraro laŭ kiu oni devas kontentigi sin mem, kiam oni posedas, nek sunon, nek akvon, nek teron, nek sufiĉajn fortojn por ĉion produkti? La laboro fariĝas aĉa kiam ĝia grandega produkto estas uzata nur por ŝveligi la vantecon. Atentu, kamaradoj!

Sed la aliaj respondis:

— Trompon kaj malkuraĝon predikas la voĉo, kiu parolis, la destino de la laboro estas la riĉaĵo kaj ĉi lastan oni atingas nur se oni liberigas de la laboro de la najbaroj. Esti memsufiĉa, tia estas la leĝo.

— Jes, la leĝo de la mizero, ho, antaŭaj fratoj! Kaj la mizero enviema kaj veneniga, kiu estas la plej malbona el ĉiuj!

ESPERANTO EN HAVANA, ĈEFURBO DE KUBO



Ekspozicio de esperantaĵoj okazinta en Septembro 1940a en Havana, ĉefurbo de Kubo, ĉe la "Cirklo de Belartoj", organizita de s-ro Heriberto Cocina, delegito de I E L, sub la aŭspicioj de la *Habana Esp. Grupo*.

— Tiel li vane parolis. Ĉar ne ĉiuj konvertiĝis al la nova dogmo, kaj mi la unua ekkomencis planti kaj amasigi maniokon, pli da manioko! Kaj la alia faris la samon pri sia maizo, kaj tiu alia pri siaj bananoj. Kaj teren tre- nante la grandan flagon de la soli- dara laboro, ni hisis sur ĉiu parcelo tiun de la persona sukceso.

Kia sukceso, sinjoroj! Piramidoj da orangoj kaj bananoj, fazeoloj, spikoj kaj aliaj, tiam senmezure leviĝis, tiel ke la kerno de tiu sukceso ĝuste sur tio baziĝis. Ĉu vi bone komprenas? Kare vendi niajn produktojn kaj aĉeti malkare tiujn de la najbaroj.

Ĉu vi kaptis la aferon? Ĉu vi taksas ĝis la kerno la diablan artifikon? Du kontraŭ unu, tio estas komerci, triumfi, amikoj!

Nu bone. Kiam la unuaj malvar- maj tagoj plivigliĝis, la apetito kaj la merkato malfermiĝis, mirego kiel fulmo ankaŭ falis sur niajn kapojn: la grandioza artifiko, kiun ĉiu opiniis estis eltrovinta, ankaŭ infektis ĉies korojn. Ĉiu vartis ĝin kiel la sankta fajro de gajno, kiu lin riĉigos je kosto de la mankoj de sia najbaro.

Tial, kiam la merkato malfermiĝis, nenia honesta soifo, nenia lojala mal- sato povis esti satigata.

— Ĉu vi bezonas bananojn, ĉu? Ni interŝanĝos al vi unu kontraŭ kvin mandarenoj. Estas tute klare.

— Sed vi mem bezonas mandare- nojn por via nutrado. Estas facile al vi ilin akiri. Donu al mi kvin bana-

nojn kontraŭ tiu ĉi mandareno, kaj ĝi estos via.

— Sinjoroj! Ni ĉiuj, ĉiuj falis en la malfermitan buŝegon de la abismo. Eĉ la plej eta postulato, la plej ele- menta kriterio de saĝeco estis al ni fremda. Ni ĉiuj blinde kredis, ke kiam ni interŝanĝis bananon kontraŭ kvin orangoj, la viktimo redonos al ni mal- avarecon kontraŭ rabemo. Ni estis tiom solene stultaj, ke jam tro mal- frue ni komprenis ke tiu glavo havis du tranĉandojn. Kaj tie ili restas, si- dantaj kiel putrantaj dioj sur pirami- doj da apartaj nutraĵoj, kiuj tamen ne povas ilin nutri.

Tiel estas. Ni mortas, ni sufokiĝas pro malsato sur la riĉaĵoj. Kion fari?

Kun freneza gesto, la homo silentis. Ni rigardis lin senvorte, kiel ian dion estiĝintan el ia nekonata religio de pu- tranta riĉeco kaj mizera senmorteco.

Tiam el nia grupo, iu eldiris kel- kajn vortojn.

— Bruligu la piramidojn — li diris — kaj kune kun ili la vermon, kiu ilin kreis kaj ilin submangas. Rekomencu poste vian antaŭan vivon.

La malsata homo larĝe malfermis la okulojn, tremis dum longa momen- to de la kapo ĝis la piedoj, kaj subite sin jetis en la arbaron, portante bran- ĉon, kvazaŭ torĉon.

Ni ne scias, ĉu li sekvis la konsilon, nek ĉu la senutilaj kaj hontigaj pira- midoj estis detruitaj kune kun la kre- inta vermo.

Konsiderante la distancon, kiu nin

SUR LA SOJLO DE LA NOVA JARO...

Tiu ĉi novjarsaluto de E. Malmgren, funkcia prez. de IEL, estas direktata ne nur al la sveda esperantistaro sed ankaŭ al tiuj alilandaj samideanoj, kiujn espereble atingos nia gazeto.

La jaro 1940 forpasis. Eble la plej riska jaro ĝis nun por Esperanto. En sia komenco ĝi tamen estis sufiĉe esperiga. Por anstataŭigi la universalan kongreson la svedoj kun entuziasmo komencis prepari grandan konferencon por la nordaj landoj. Ankaŭ aliaj konferencoj estis planitaj.

Sed la printempo alportis mortbato al ĉiuj konferenc-projektoj. La milito evoluigis fulmrapide. La interrilatoj rompiĝis. Dum pluraj monatoj ni estis tute neinformitaj pri la sorto de niaj amikoj. Sed iom post iom la kurteno de nescio levigis. Kaj en tiu ĉi momento mi povas sciigi al vi, ke mi denove havas kontakton kun esperantistoj en ĉiuj landoj de Eŭropo, escepte de la okupita parto de Francujo.

Kion diras do niaj amikoj norde en Norvegujo, sude en Italujo, okcidente en Anglujo, oriente en Sovjetunio? Ĉu ili estas pesimismaj? Ĉu ili senkurage kaj senspere ĉesis labori por Esperanto?

Jen mi montras al vi kelkajn bildojn el la esperantista vivo dum la jaro 1940! Unue el Narvik, tiu norda urbo en Norvegujo, ĉirkaŭ kiu batalis la norvegoj, germanoj kaj angloj. La urbo estis furioze bombardita. Por la civitanoj estis neeble plenumi sian profesion laboron. Ili devis resti multajn horojn en bombsekuraj keloj. Kion faris la esperantistoj tie? Nu jen: ili aranĝis Esperanto-kunvenojn kaj ekzercis nian lingvon!

Kaj la nederlandanoj? vi demandas. Vi povas mem prijuĝi la situacion, kiam vi aŭdas, ke la nederlanda esperanto-gazeto regule aperas kiel antaŭ la milito! Cetere Heroldo de Esperanto kaj La Praktiko eldonis kelkajn novajn numerojn speciale por la nederlandanoj kaj germanoj!

En Anglujo la esperantistoj daŭrigas sian agadon same diligente kiel kutime. Nia talenta ĝenerala sekre-

tario Goldsmith ĵus informis min telegrafe, ke IEL finis la jaron 1940 sen ia deficito! Mi certe ne erare divenas, kiam mi supozas, ke la anglaj samideanoj sentas kiel sia honora devo en la nuna tempo vivteni nian centran oficejon kaj tiel per malavaraĵoj donacoj ebligas ĝian laboron. En miaj manoj, mi tenas kiel rezulton i. a. la duan parton de la jarlibro 1940 kaj la sep-okt.-numeron de Esperanto Internacia. La supre menciita telegramo cetere petis min transdoni de Goldsmith, Oliver kaj de ĉiuj anglaj esperantistoj korajn novjarsalutojn: Oni fartas bone laŭ la cirkonstancoj kaj la esperantista vivo en kluboj kaj kursoj estas kontentige vigla!

Jen kelkaj bildoj. Mi povus multobligi la ekzemplojn. Mi povus rakonti pri la grandaj Esperanto-kursoj en Jugoslavio kaj Italujo. Mi povus priskribi vigan Esperanto-laboron en Hungarujo kaj Portugalujo. Jes, el la plej multaj landoj mi povus citi tiajn raportojn, ke la esperantista koro batas pro ĝojo.

Sed de tempo al tempo miaj pensoj vagas al Francujo: al generalo Bastien, s-roj Couteaux, Petit kaj multaj aliaj amikoj. Kiel ili nun fartas? Je ilia braveco kaj fideleco mi ja nepre kredas. Kaj mia kredo fariĝis certeco, kiam mi antaŭ unu monato ricevis la plej unuan vivsignon el la neokupita parto de Francujo. Estis nova Esperanto-libro! "Kleraj virinoj" de Molière, tradukita de prof. Boucon en Annecy kaj presita en aŭgusto 1940!!! Ĉu iu ajn post tia brava provo de esperantista aktiveco povas dubi pri la fideleco de la franca esperantistaro!

Ĉio donas al ni plej fortan instigon kaj kuraĝon por la jaro 1940. Ĉar ni nun scias, ke kia ajn estos la eksteraj cirkonstancoj, nenio povos haltigi la Esperanto-movadon! Tion montris per kuraĝaj agoj vi: Aberg kaj Strömer, Fejde kaj Bengtsson! Ĉu vi trovis nevenkeblajn malfacilaĵojn! Ho ne! Ĉu vi: Jensson kaj Vilki, Justesen kaj Kempeneers nun finis organizi la Esperanto-agadon? Neniam! Sed vi Jung kaj Grolleman, Walder kaj Balkanyi: ĉu vi povus imagi al vi daŭrigi la vivon sen Esperanto? Neeble! Kaj al lertaj gvidantoj Lapenna kaj Carreira: ĉu via vivo havus signifon sen Esperanto? Ne, vi ja mem diris ke tago sen Esperanto estas perdita tago por vi!

Karaj amikoj, mi volus citi la nomojn de vi ĉiuj, ĉar vi meritas tion! Vi laboris diligente en via loko, kaj vi laboros! Memoru, ke vi ne laboras izole. Mi kaj mi kaj ree mil amikoj tra la mondo pensas pri vi kaj pri via

ESPERANTO EN URUGVAJO

El letero sendita al la prez. de B. L. E. de s-ro Viktoro L. Cao Cabanas, loĝanta en Montevideo (Brandzen, 2267), al kiu nia Ligo sendis esperantaĵojn por propagando ĉe la tiea oficistaro, ni elĉerpis la jenon: "Mi ne povas sendi nun artikolon pri la propagando en tiu ĉi lando, ĉar ankorau ne estis eble atingi eĉ sukceseton. Nur oni sukcesis dum la pasinta jaro, per la instruado de Esperanto. La "Urugvaja Esperanto-Societo" gvidis kurseton en 12 lecionoj, per korespondado, kiun, malgraŭ la nesufiĉa propagando farita, partoprenis pli ol 50 lernantoj. Oni intencas propagandi pli intense dum venonta aŭtuno kaj eble tiu nombro povos esti plialtigita. Ĉiel mi informos vin, sinjoro Prezidanto, pri ia bona sukceso de Esperanto en Urugvajo."

Ni esperas, ke baldaŭ s-ro Cabanas donos al ni kontentigan novaĵon.

ESPERANTO EN MEKSIKO

Laŭ cirkulero ricevita el Meksiko, devis okazi la 15an de Marto nunjara, ĉe la "Centro Español", en Maksikurbo, la "Unua Ĝenerala Kunveno en Meksiko", kun ĉeesto de eminentaj hispanaj esperantistoj. Ĝia programo konsistis el: Inaŭgura Saluto de d-ro A. Vargas Valencia, prez. de la Centra Meksika Esperanta Asocio"; vortoj de s-ro E. Lanti, konata esperantisto; vortoj de s-ro Jesús Amaya, direktoro de "Renovigo", kaj ĝeneralaj aferoj.

La cirkulero ankaŭ sciigas, ke ekde la 5a de Aprilo okazos Esperanta Disaŭdigo, titolita "Mia Voĉo al la Mondo el Meksiko", pere de la kultura radistacio X. E. W. (49 metroj, 60 kilocikloj). La disaŭdigo okazos ĉusabate, de la 19a ĝis la 19.30a horo.

Ni esperas, ke la kunveno bone sukcesis kaj ke ĝi vigligos la Esperantomovadon en tiu grava amerika lando.

laboro. Memoru, ke la sukceso de Esperanto dependas ĝuste de via laboro, de via fideleco!

Kiam mi do rerigardas al la jaro 1940, tiom plena je malfacilaĵoj eksteraj kaj tamen tiom esperiga por la Esperantomovado, mi sen timo rigardas al la nova jaro. La Esperantotrupoj estas nun harditaj. La Esperantotrupoj jam montriĝis esti nevenkeblaj! Tial mi kun fido kaj espero bondeziras al vi:

BONAN NOVAN JARON 1941!

E. Malmgren.

disigas de ili, la fumo, se ĝi ekzistas, ne alvenis ankoraŭ ĝis ĉi tie.

Sed ni esperas ĝin vidi iun tagon.

Trad. J. HESS.

ESPERANTO EN KANADO

S-ro David R. Pook, sek. de la "Kanada Esperantista Asocio", skribis al la prez. de B. L. E., leteron, per kiu li sciigas lin, ke: "La Esperanta movado en Kanado malbone fartas pro la milito... La "Tutamerika Numero" estis bona kaj plaĉis al mi sufiĉe. Mi nur bedaŭras, ke ni ne povis sendi pli multe da materialo. Nuntempe la Kanada Asocio ne povas helpi al vi."

Ni esperas, ke en nia tria numero aperos verkoj de niaj kanadaj samideanoj.

RECENZOJ

Statistika Resumeto, ekstraktita el la Brazila Statistika Jarlibro, jaro 1938. 32 paĝoj. Ekzempleroj riceveblaj senpage de la eldonejo: Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, Rio de Janeiro.

La Brazila Registaro denove eldonis Statistikan Resumeton en Esperanto. La libreto entenas amason da utilaj ciferoj pri Brazilo, fotografajon de la Prezidanto de la Brazila Respubliko, kaj antaŭparolon de la Ĝenerala Sekretario de la Instituto. La diversaj statistikoj rilatas al la fizika, demografia, ekonomia, socia, kultura, administracia kaj politika situacioj.

En moderna vivo statistikoj ludas gravan rolon. En ĉiu granda oficejo troviĝas la eldonaĵoj de diversaj landoj pri importado, eksportado, industrioj, enloĝantoj, k.t.p., sed escepte je la plej grandaj kaj monhavantaj landoj la registaroj uzas kutime nur la lingvon de la propra lando. Tio estas granda malhelpo. En oficejoj oni havigas tradukon de la titoloj de la ĉefaj ĉapitroj kaj penas diveni la signifon de la subtitoloj kaj ciferkategorioj. Ĉiam estas danĝero ke oni miskomprenos kaj misuzos ciferojn: ĉiam estas danĝero ke oni eĉ ne scios ke la serĉata informo estas fakte en la libro.

Mi havas konstantan kaj preskaŭ ĉiutagan kontakton kun tiaj volumoj, kaj la aperigo de statistika resumeto en klare kaj facile komprenebla lingvo kiel Esperanto varmigis la koron. Mi kore gratulas la Brazilan Instituton. Mi esperas ke ĝi daŭre ĉiujare eldonos similan broŝureton, kaj mi forte rekomendas al aliaj registaroj ke ili pripensu la eblecon sekvi ĉi tiun plej imitindan ekzemplon.

A. C. O.

(El "Esperanto Internacia")

Revista de Correos y Telegrafos

Ni ricevis la numeron 37an de la "Revista de Correos y Telegrafos", oficiala monata eldono de la Direkcio de Poŝto kaj Telegrafo en la Argentina Respubliko. Ĝi enhavas 64 paĝojn kaj publikigas diversajn artikolojn tradukitajn el esperantaj revuoj, el kiuj meritas specialan mencion la jenaj: La Interligilo de P. P. T. T." kaj "La Praktiko". Ilin tradukis s-ro Amadeu P. Soler, el Rosario.

ANTAŬEN! MARSU!

Esperanto! Esperanto!
Vin laŭdegas ni per kanto;
Povo, gloro kun honoro
Post provado kronu vin!
Vin servadas vole ni;
Nin kompensos fine vi;
Venko en decida horo
Venos por ĝojigi nin.

Esperanto! Via stelo
Tiras nin al alta celo;
Kun sincero ni laŭ vero
Direktadas nin al ĝi.
Nia fido regas nin;
La espero vekas sin;
Vivu! Vivu la Afero!
Esperanto! Vivu vi!

(El "Poemoj por Junuloj", de Hugh Irvin Keyes, poetlaŭreato de Esperanto. Numero 10 de ESTU PRETA, eldonata de la Junulara Komitato. ESPERANTO-ASOCIO DE NORD-AMERIKO.)

Triumfkrio el Japanujo. Esperanto en regula radioprogramo

La Revuo Orienta festas en sia decembra numero la Zamenhofan tagon per triumfa sciigo ke la Japana Brodkasta Korporacio (JBK) oficiale decidis enkonduki esperanton en sian programon por la transmaraĵoj aŭskultantoj komence de januaro 1941. Sinjoro A. Namikawa, aktiva sekciestro por programoj de transmara brodkasto, turnis sin al la Esperanto-Instituto por konsilo je la preparado de la programoj, kiuj okazos almenaŭ en ĉiu dua semajno.

Okaze de la efektivigo de la esperanta horo la korporacio estas preta meti esperantan kolonon en la monata organo de la fako por transmara brodkasto, kiun oni distribuas al eksterlandaj aŭskultantoj.

Ni esperantistoj en la tuta mondo partoprenas en la ĝojo de niaj japanaj kamaradoj pri tia sukceso por nia lingvo. Ni ankaŭ devas montri tion, kaj pro tio ni admonas al vi tuj peti per poŝtkarto ekzempleron de la Monata Organo por Transmara Brodkasto ĉe Japana Brodkasta Korporacio, Utiyamasita-tyo, Kozimati-ku, Tokio, Japan.

PAGU VIAN
NUNJARAN KOTIZON

"LA PRAKTIKO" VOLAS PLUVIVI!

... Malgraŭ la fatalaj okazintaĵoj, kiel tiel forte skuis la popolojn de Eŭropo, ni firme tenas la esperon, ke baldaŭ revenos la paco, kaj ke ĝi estos vera paco, justa kaj daŭra. Kun la optimismo de idealistoj kaj kun la pacienco de saĝuloj ni fidu, ke la nuna mondhistoria luktado de gigantaj fortoj kontribuos al la solvigo de grandaj mondproblemoj, kaj ke ĝi alproksimigos la homaron al la idealoj de interŝtata ordo kaj interpopola frateco, kiujn ĉiuj popoloj en la koro tiel arde sopiras.

Kia ajn estos la aspekto de la postmilita mondo, certa estas tio, ke granda kaj kreskanta estos la bezono de neŭtrala internacia lingvo. Do ni, esperantistoj, povos kaj devos daŭrigi nian belan kaj utilan agadon. Sed ankaŭ nun, dum la malluma tempo de la milito, ni faru tiom, kiom ni povas: ni laŭpove disvastigu Esperanton kaj ni fervore preparu nin al la postmilita agado, diligente studante kaj ekzercante nian lingvon. Kaj super ĉio: restu ni ĉiuj nepre fidelaj al nia kara verdstela standardo!

(Eltiraĵo el gvidartikolo de LA PRAKTIKO, aperinta post la okupacio de Nederlando).

La legado de tiu eltiraĵo faris al ni grandan plezuron, ĉar la malapero de la tre simpatia revuo "La Praktiko" kaŭzis malĝojon al ĉiu vera esperantisto. Ni esperas, ke la menciita numero alvenos al niaj manoj, ĉar ni jam havis la plezuron ricevi ĉiujn, numerojn de la lasta jarduono. (Noto de la redakcio).

La jarabono de "La Praktiko" kostas 16 respondkuponojn..

Guia de Conversação Português Esperanto

e

Correspondência Comercial

Compilado por Ismael Gomes Braga

Editado pela LIVRARIA EDITORA DA FEDERAÇÃO E. BRASILEIRA — Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro. — Preço: 4\$000.

Livro indispensável a todo esperantista que deseja aperfeiçoar-se na conversação e correspondência com samideanos estrangeiros.


PATAGONIO VIDITA DE BRAZILANO

En tiu ĉi artikolo profesoro Fróis Abreu, Teknika Konsilanto de la Nacia Konsilantaro de Geografio, resumas siajn observojn faritajn dum vojaĝo al Patagonio, ĉe la najbara Argentina Respubliko. Pentrante aspektojn de malmulte konata regiono, li volis, nur kaj simple, stimuli similajn iniciatojn al tiuj "trafrontaj tiom da terspacoj de nia marbordo, ankoraŭ malmulte konataj kaj neniam priskribitaj".

De Buenos Aires, sin direktante su-

maro. Estas oftaj la mallargaj valoj (veraj "canions") kaj la krutaĵoj, kiuj vidigas la serion da horizontalaj tavoloj de la terciaraj sternaĵoj, kies agitigoj apartenis al la tipo "fraturas" (rompiĝoj). Tial Patagonio prezentigas kiel serio da "mesetas", kun malsamaj planoj kaj grandecoj.

En Comodoro la topografio estas tabula, preskaŭ vegetnuda, kun kelkaj reliefoj ĉe la profiloj, rezultantaj de tavoloj pli rezistaj al la erozio. Ili venas ĝis la maro kaj tie falas vertikal-



Parto de la petrola kampo sub la Oceano.

den al Baía Blanca (Blanka Golfeto), li superflugis super grandega ebenaĵo, je ĉirkaŭ 600 kilometroj, kun abundeco da bovobrutaro kaj kovrita per verdaj paŝtejoj (dum la monato Majo). Malsamaj ol la tipo de brazila farmbieno, la konstruaĵoj el zinklado kaj la brutaro estas loĝigataj en tute fermitaj staloj, laŭ la postulo de la klimato. La solaj reliefoj de la topografio estas reprezentataj de la *Serra Ventana* kaj iliaj profiloj elmontras seriojn sedimentajn aŭ metamorfozajn kun forta tektonismo.

Post Baía Blanca tiu aspekto ŝanĝiĝas. Malaperas la farmbieno, la kulturitaj kamparoj kaj la akvo. Tiam komenciĝas, klare, la transiro al la senakvaj teroj de Patagonio. Post 360 kilometroj, rektlinie, aperas la unua "oazo", Sankta Antono de l' Okcidento, domaro ĉe la bordo de l' Oceano.

Plian horon de flugado super la malbonaj terenoj kaj aperas alia "oazo" — Trelew. Ĝi estas malgaja kaj griza, sed oni informas, ke ĉe la centro, laŭlonge de rivero, ekzistas bonaj fruktaj kaj legomaj kulturejoj kaj tio konfirmas, ke en Patagonio la riĉeco estas funkcio de la akvebleco.

De tie ĝis Comodoro Rivadavia (360 km.) etendiĝas pluen la dezerto. La topografio iĝas pli malregula, ĉar la patagonia ebenaĵo alproksimiĝas al la

skarpe. Belaj tipoj de "falésias" povas esti vidataj norde kaj sude. Diversaj pecoj estas en konstanta disrigo. La supraĵaj tavoloj, konsistantaj el argilo, ŝanĝiĝas, dum la seka epoko, al sufokaj kaj densaj nuboj da polvo. Pro la pluvo la polvo fariĝas glitita koto, kiu kovras stratojn kaj vojojn, kaj tio trudas la preskaŭ devigan uzon de ĉenoj sur la pneŭmatikoj de l' veturiloj.

La klimato ludas gravan rolon ĉe la loĝatigo, ĉar ĝi estas selekteca; pro sia rigoro ĝi forigas la malfortulojn kaj nur al la fortuloj ĝi permesas vivi. La medio treega seka (45% de relativa unuo, observis la aŭtoro).

Fora kaj intensega vento, preskaŭ konstanta. Se iu piediras laŭ ĝia direkto, tiu devas forte piedpremi la teron, por ke la vento ne lin kunportu; se li iras kontraŭ la vento, li bezonas klini la korpon antaŭen kaj iom turniĝi flanken. Ĉapoj anstataŭas la larĝrandajn ĉapelojn kaj estas ĝeneraliĝita la uzo de aŭtomobilo por eviti la lacigajn piediradojn. Laŭ informoj, oni kalkulas unu veturilon por ĉiu ok loĝantoj. Sin sentigas tiu influo eĉ ĉe la konstruaĵoj, kiuj estas orientitaj tiamaniere ke ili ŝirmiĝas kontraŭ la vento, kaj en la ĝardenoj estas ventosirmiloj.

La aviado malfermis novajn hori-

zontojn al Patagonio, ĉar la distanco inter Comodoro kaj Buenos Aires, kiu antaŭe estis traveturata en tri tagoj, nun daŭras nur ses horojn.

Ĝia loĝantaro estas tre kosmopolita kaj oni rakontas, ke iam ĉe la YPE (*Yacimientos Petroliferos Federales*), federacia organizaĵo, troviĝis dungitoj el 64 nacioj.

Nur la esplorado de petrolo permesas kompreni tiel grandan homamason en loko tiel dezerta kaj kun kondiĉoj medirilataj tiel malfavoraj al daŭra lokatiĝo. Ĉio tio estas rekte ligata al la petrolo kaj tial Comodoro Rivadavia posedas la trajton de granda firmstara urbo, kun kolegioj, teatroj, kinematografejoj, komercaj entreprenoj, preĝejo, kc. La esplorado de petrolo estas farata de la YPF. Provizita per la gasoj de l' petrolaj putoj, uzino je ĉirkaŭ 30.000 km. liveras la tutan energion necesan al la elektrigitaj servoj de la YPF.

La sondado per la sistemo *rotary* anstataŭis la antikvajn frapsondilojn. Ekzistas nun ĉirkaŭ 25 sondiloj en aktiva laboro ĉe la kamparoj de Comodoro, preskaŭ ĉiuj elektrigitaj. La profundeco de la putoj ĉe la marbordo estas ĝenerale je 600 metroj, necesa por atingi la ĉefan olesupraĵon, sed internlande ĝi atingas ĝis 1.000 metroj. Pro manko de premo en la putoj, kiuj ne ŝprucas, estas necese uzi pumpilojn kaj tial la produktkvanto estas tre variema.

Ĉe la km. 27 de la Fervojo, kiu iras al Kolonio Sarmiento, ekzistas la *Kampanio Diadema Argentina de Petroleo S. A.*, filiita al la grupo *Royal Dutch and Shell*.

Finante sian artikolon, li diras, ke el la klopodo por la serĉado de akvo por kvietigi la soifon de la malmultaj personoj tie vivantaj en 1907 rezultis la eltrovo de l' petrolo. La argentiano sciis profiti el tiu fakto kaj, per moderna laboro, kaj pli ol ĉio, fortigita per granda sento de fido kaj patriotismo, venkis ĉiujn barojn kaj sciis aliformigi la dezerton en unu el la plej gravaj kaj produktemaj zonoj de sia lando. Li laŭte petegas al la brazilanoj, ke ili aplaŭdu tiun grandan realigaĵon de niaj najbaroj, kiel ekzemplon sekvtan ĉe la esplorado de la duonsigno de petrolo en kelkaj brazilaj regionoj.

(*Resumo en Esperanto de artikolo titolita "Patagonio vidita de brazilano" verkita de Prof. Fróis Abreu kaj aperinta en la "Revista Brasileira de Geografia", oficiala organo de la "Nacia Konsilantaro de Geografio", fako de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko"*).